

Eduard Ebel,  
Milde falas la  
neĝ'

*tradukita de N. N.  
01*

Milde falas la neĝ',  
Lago silentas en  
preg',  
Arboj en brilblanka  
vest'.  
Ĝoju pri kristnaska  
fest !

Nun varmiĝas la  
kor',  
Ĉesas ĉagren' kaj  
dolor',  
Ĝoju pri Dia ĉeest'.  
Ĝoju pri kristnaska  
fest!

Sankta nokto de Di',  
Vekas anĝelhoron ĝi,  
Sonas ĉarmega  
atest':  
Ĝoju pri kristnaska  
fest'!

*Traduko de la Ger-  
mana poemo "Leise  
rieselt der Schnee"  
de EDUARD EBEL  
(Eduardo Ebelo,  
\*1839 - †1905) en  
Esperanton de N. N.  
01.*

*MR-012-NN-1 / Arg-  
99-201 (2003-12-11  
08:46:13)*

*MR-012-NN-1*

Eduard Ebel,  
Neĝas nun ĉie  
ĉi

*tradukita de Manfre-  
do Ratislavo*

Neĝas nun ĉie ĉi,  
lagon kovras glaci',  
brilas kristnaske ar-  
bar'.  
Ĝoju vi, ho krista-  
nar'!

Varma estas la kor',  
malaperas dolor',  
venas savant' de l'  
homar'.  
Ĝoju vi, ho krista-  
nar'!

Malleviĝis la sun',  
sankta nokt' estas  
nun,  
kantas por ni  
anĝelar':  
Ĝoju vi, ho krista-  
nar'!

*Traduko de la Ger-  
mana poemo "Leise  
rieselt der Schnee"  
de EDUARD EBEL  
(Eduardo Ebelo,  
\*1839 - †1905) en  
Esperanton de MAN-  
FREDO RATISLAVO  
(Manfred Retzlaff,  
Stettiner Str. 16,  
D-59302 Oelde, Ger-  
manio, \*1938-11-04).*

*Arg-99-199 (2003-12-  
11 08:30:04)*

*MR-012-3*

Eduard Ebel,  
Flustre falas  
la neĝ'

*tradukita de Josef  
Kühnel*

Flustre falas la neĝ'.  
Lag' rigidas laŭ leĝ'.  
Kristfeste brilas ar-  
bar'.  
Ĝoju pri Kristo, ho-  
mar'!

Varma estas en kor'.  
Foras ĉiu dolor'.  
Fuĝas la vivoamar'.  
Ĝoju pri Kristo, ho-  
mar'!

Sankta nokta lum-  
bril'  
kaj ĉiela jubil'  
logas laŭ ĉarma fan-  
far':  
Ĝoju pri Kristo, ho-  
mar'!

*Traduko de la Ger-  
mana poemo "Leise  
rieselt der Schnee"  
de EDUARD EBEL  
(Eduardo Ebelo,  
\*1839 - †1905) en  
Esperanton de Josef  
Kühnel.*

*MR-012-JK-1 / Arg-  
99-202 (2010-09-18  
19:50:56)*

*MR-012-JK1*

Eduard Ebel,  
Leise rieselt der  
Schnee

Leise rieselt der Schnee,  
still und starr ruht der See,  
weihnachtlich glänzet der  
Wald.  
Freue dich, Christkind  
kommt bald!

In den Herzen ist's warm,  
still schweigt Kummer und  
Harm,  
Sorge des Lebens verhallt.  
Freue dich, Christkind  
kommt bald.

Bald ist heilige Nacht,  
Chor der Engel erwacht,  
hört nur, wie lieblich es  
schallt:  
Freue dich, Christkind  
kommt bald!

*Verkinto de tiu ĉi Germana  
poemo estas EDUARD EBEL  
(Eduardo Ebelo, \*1839 -  
†1905).*

*MR-012-3 / Arg-99-198 (2014-  
04-23 17:57:42)*

*Vidu ankaŭ: [http://de.wikipedia.org/wiki/Leise\\_rieselt\\_der\\_Schnee](http://de.wikipedia.org/wiki/Leise_rieselt_der_Schnee).*